

EL POPOLA ĈINIO

人民中國報道

EN TIU ĜI NUMERO:

Mi Ja Ĝojas pro Tio

Kresko de la Granda Arterio en Sud-okecidenta Ĉinio

Liberigintaj Eovpastistoj Kaj Tekstistinoj

Nova Sperto por la Popolamaso Ĉinaj Laboristoj sur Kultura Fronto

Monata Informa Bulteno Eldonata de Fremdlingva Eldonejo
Redakcio kaj Administracio: 26 Kuo Hui Chieh, Peking, Ĉinio

VOL. II N-RO 7
JUL. 1951

La Ĉina Komunista Partio Gvidas Landokonstruon



—Ĉi tiu artikolo estas verkita de Ĉen Jun, membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Ĉina Komunista Partio, por rememorigi la 30an datrevenon de la fondiĝo de la Partio. Ĝi estas ĉi tie iom mallongige tradukita.—

Post 30 jaroj da luktado, la Ĉina Komunista Partio jam gvidis la popolon al venko en la revolucio, kaj de tiam denove gvidas la laboron de landokonstruo. Por revui la laboron de landokonstruo en la pasintaj unu kaj duona jaroj kaj la gradon de progreso akirita, oni devas unue kompreni, sur kia malnova fundamento efektiviĝas ĉi tiu landokonstruo, i.e., kia lando estis la malnova Ĉinio sur kiu la nova Ĉinio estas konstruata.

Nia lando estas lando kun vasta teritorio, abundaj produktoj kaj naturprovizoj. Ĝi havas historion de 5,000 jaroj, kaj loĝantaron de 475 milionoj. Ni estas granda nacio. Sed en la pasintaj 100 jaroj la kondiĉoj havas jenajn karakterizojn. Unue, ni suferis agreson de la imperiistoj dum pli ol cent jaroj, kun la okupado de Nordorienta Ĉinio fare de la japanaj imperiistoj dum 14 jaroj. Feŭdismo kaj monopola burokrata kapitalismo de Ĉinio servis kiel iloj de imperiismo por regi la popolon, kiu dum longaj jaroj estis subpremata de ĉi tiuj tri.

Due, pro la imperiisma agreso kaj longaj jaroj da reakcia regado, la ekonomio de nia lando estas neprograsa. Moderna industria produkto konsistigas nur ĉirkaŭ 10 procentojn el la tuta valoro de nacia produkto. Sed tio sola ne donas kompletan bildon de la graveco de la situacio. La situacio estas grava, ĉar tre granda proporcio el ĉi tiuj malmultaj modernaj industrioj estis kontrolata de imperiismo. La Nordoriento estas la ĉefa regiono de peza industrio en Ĉinio, sed la industrio tie estis sub la senpera kontrolo de japana imperiismo. Per armita invado kaj ekonomia agreso imperiismo pere aŭ senpere akiris kontrolon super multaj industrioj en Ĉinio. Aliflanke, ĉar agrikulturo kaj metiindustrio konsistigas tiel altan procenton el la ĉina nacia ekonomio, kaj Ĉinio estis konata kiel agrikultura lando, ĝi ja devis kapabli sin provizi en agrikultura produkto. Tamen, male, Ĉinio estinte ofte importis sufiĉe grandajn kvantojn da grenoj kaj kotono ĉiu jare.

Trie, post 25 jaroj da militoj inter la militaristoj kaj longaj jaroj da enlanda revolucia milito, nia lando entreprenis aliajn ok jarojn da Rezistmilito kontraŭ Japanio kaj kvar jarojn da Popola Liberiga Milito. Ĉio ĉi tio faris al nia nacia ekonomio grandan damaĝon. La jaro 1949 estis jaro de inundoj. La tuta agrikultura produkto atingis nur 75 procentojn de la meza produkto antaŭ la Rezistmilito kontraŭ Japanio. Industria produkto en 1949 estis eĉ pli malbona, kompare kun la plej alta nivelo de 1943. La lastaj 12 jaroj da milito ege detruis la komercajn rilatojn de varinterŝanĝo inter la urbo kaj kamparo kaj inter Ĉinio kaj fremdlandoj. Tio estas skizo de la malnova Ĉinio. Sur tia malnova fundamento la Centra Popola Registaro, gvidata de la Ĉina Komunista Partio, konstruas la novan Ĉinion.

En la lastaj unu kaj duona jaroj, en la ekonomia kampo, ni efektiviĝis jenajn gravajn laborojn:

1. Ĉiuj fabrikoj, minejoj, fervojoj, ŝipoj kaj bankoj de japana imperiismo aŭ Kuomintang-burokrata kapitalo estas transprenitaj kaj

ŝanĝitaj en ŝtatfunkciajn entreprenojn posedatajn de la Ĉina Popola Respubliko. En la ŝtatfunkciaj entreprenoj, ni dependas de la amasego de laboristoj, kaj unuigas kun la teknikistoj kaj oficistoj, kaj tiel transformis la burokratajn entreprenojn en entreprenojn de la popolo. La entuziasmo por laboro flanke de la laboristoj, teknikistoj kaj oficistoj ege altiĝis, pro la altiĝo de la politika pozicio de la laboristoj kaj la zorgo montrata de la ŝtato por la bonstato de la laboristoj kaj oficistoj. Laborproduktivo ĝenerale jam superis la nivelojn atingitajn dum la regado de la japanoj kaj Kuomintang.

2. La senbrida inflacio dum 12 jaroj estas haltigita. Tio efektiviĝis per la centralizita administracio de la ŝtataj financo kaj ekonomio, per la kontrolo de la tutaj kvantoj de kontanta mono de registaraj institucioj fare de la ŝtata banko, kaj per registigo de enspezo kaj ŝparo de elspezo por atingi proksimuman budgetan bilancan. Ĉar inflacio estas haltigita, ŝtatfunkciata komercado jam transprenis la superregan pozicion en la merkato antaŭe okupata de spekulaciantaj komercistoj kaj la financoj jam stabiligis, tio ege sekurigis la vivon de la popolo.

3. Agrikultura produkto estas pliigita. Dank' al la agrara reformo, adopto de la politiko antaŭenigi agrikulturon, la levigo de la kamparana entuziasmo por produktado kaj la ĝenerale normaj veteraj kondiĉoj, la tuta grenprodukto de la lando en 1950 estis 14 procentojn super tiu de 1949, jaro de inundoj. Konsidere la tutan landon, agrikultura produkto ankoraŭ ne atingis la antaŭmilitan nivelon, sed en plejparto de la malnovaj liberigitaj regionoj ĝi jam atingis la antaŭmilitan nivelon. Kvankam kotonprodukto en 1950 estis pli malalta ol en 1936, la nura elstaranta rekordjaro de kotonprodukto en ĉina historio, tamen ĝi superis ĉiujn aliajn antaŭmilitajn jarojn. Se ne estos natura katastrofo, kotonprodukto de ĉi tiu jaro superos tiun de 1936.

Pligo de gren- kaj koton-produkto estas grava al nia lando, ne nur ĉar agrikulturo konsistigas la pli grandan parton de nia nacia ekonomio, sed ankaŭ ĉar en la pasinteco ni dependis de importado de grenoj kaj kotono en grandaj kvantoj. Koncerne grenojn, ni ne nur venkis la malfacilaĵojn kaŭzitajn de la gravaj inundoj de 1949, sed ni jam estas kapablaj ĉijare helpi la popolon de najbara lando, Hindio, al kiu mankas grenoj kaj ni subskribis kontrakton kun la Registaro de Hindio por la eksporto de 516,000 tunoj da greno al Hindio.

La Usonaj imperiistoj faras ekonomian blokadon por malhelpi la ĉinan popolon interŝanĝi siajn produktojn por eksterlanda kotono. Sed ni estas certaj pri nia kapablo plene kontentigi la bezonojn de nia popolo per nia propra kotono, ĝuste kiel ni faris en la kazo de nutraĵoj. La eksterlanda moninterŝanĝo tiel ŝparita pro memsufiĉo en grenoj kaj kotono ege pligos nian kapablon aĉeti industrian ekipaĵon.

4. La interfluo de varoj inter la urbo kaj la kamparo kaj inter Ĉinio kaj fremdaj landoj estas disvolvita. En la malnova Ĉinio, la vendebla

greno kaj industriaj krudmaterialoj de la kamparanoj estis objekto de aĉetado je devigaj malaltaj prezoj fare de la bienuloj, uzura komerca kapitalo kaj imperiismo. La proverboj diroj, "Bona rikolto farigas katastrofo," kaj "Malkara greno malutilas al la kamparanoj," priskribis la tradiciajn suferojn de la ĉinaj kamparanoj. Nun la interesoj de la kamparanoj estas gardataj per aĉetado fare de la Popola Registaro de grandaj kvantoj da agrikulturaj produktoj je justaj prezoj. La produktoj de libertempaj okupoj de la kamparanoj ĝenerale konsistigas almenaŭ 10 procentojn de la tuta jara enspezo. Tial la vendo de ĉi tiuj produktoj estas afero ege grava al ilia vivo. Pro tio la Registaro faras la plej grandajn penojn por helpi la kamparanojn forvendi siajn produktojn el tiaj okupoj.

Ni Protestas Kontraŭ la Malpermeso de SEAT Fare de la Franca Registaro

Sekve de la malpermeso al agadoj de la Monda Federacio de Sindikatoj, la Virina Internacia Demokrata Federacio, la Monda Federacio de Demokrata Junularo en Francio, kaj la Monda Pac-Konsilo, nun la franca registaro denove malpermesis la agadojn kaj sidejon de SEAT (Sindikata Esperantista Asocio Tutmonda) en Francio. Tio plene signifas, ke la nuna franca registaro jam perfidas ĝisfunde la gloran demokratian tradicion de la franca popolo kaj faras ĉion por suŝoki la pacan movadon postulatan de la tutmondaj popoloj. Ni, ĉinaj esperantistoj, ege indignas pro tio kaj ni firme protestas kontraŭ la franca registaro pri tia reakcia ago. Pacamaj esperantistoj tutmondaj kaj precipe tiuj en Francio, eltiru instruon el tiu ĉi fakto. Ni intensigu la batalon por paco kaj kontraŭ la militincitado de la Usonaj imperiistoj kaj ĉiuj ĝiaj lakeoj!

Ĉina Esperanto-Ligo
El Popola Ĉinio

28, junio, 1951.



Mao Ze-tung en 1919 kiam okazis la 4-maja Movado kiu markis la komencon de nov-demokratia revolucio en Ĉinio.

Biografia Noto pri Prezidanto Mao Ze-tung

Mao Ze-tung, Prezidanto de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, estas samtempe Prezidanto de la Politika Buroo, kaj Prezidanto de la Sekretarieco de la Centra Komitato. Li naskiĝis en 1893 en Ŝiangtan-Gubernio, (湘潭縣 Hunan-Provinco (湖南省)). En 1920, li aliĝis al la Socialista Junula Ligo, embrio de la Ĉina Komunista Partio, kaj ekde tiam li jam dediĉas sian vivon al la revolucia movado de la laboristoj.

En 1921, li ĉeestis la Unuan

Tutlandan Kongreson de la Ĉina Komunista Partio. De 1921 ĝis 1923, li servis kiel Sekretario de la Hunan-Regiona Komitato de la Ĉina Komunista Partio, kaj en 1922 fariĝis Ĝenerala Sekretario de la Asocio de Laboristaj Organizaĵoj de Hunan-Provinco. En la Tria

Tut-Ĉinia Kamparana Asocio de Wuhan (武漢), Hupej-Provinco (湖北省).

Dum la 10 jaroj post la malvenko de la Granda Revolucio de 1925 ĝis 1927, lia ĉefa tasko estis gvidadi la kontraŭ-Kuomintangan militon, kun la kamparaj regionoj kiel ĝia bazo. Li restis en Kiangsi-Provinco (江西省) la plejparton de tiu ĉi periodo



Prezidanto Mao Ze-tung (la dua de-dekstre) en 1939 kun membroj de la Centra Komitato de Ĉina Komunista Partio.

Tutlanda Kongreso de la Ĉina Komunista Partio, kunvokita en 1923, li elektigis membro de la Centra Komitato kaj ankaŭ fariĝis Direktoro de ĝia Organiza Departemento.

De 1925 ĝis 1927 li agadis ĉefe en la kamparana movado. Li fariĝis Prezidanto de la Komitato de Kamparana Movado de la Centra Komitato de la Ĉina Komunista Partio, Estro de la Trejna Centro de la Tut-Ĉinia Kamparana Movado ĉe Kanton, kaj Ĝenerala Sekretario de la

ĝis la vintro de 1934 kiam li retiriĝis kun la Ruĝa Armeo de Kiangsi en la Longa Marŝo al norda Ŝensi-Provinco (陝西省). Ekde 1932, li estas membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, kaj ekde 1935 servas kiel Prezidanto de la Revolucia Milita Konsilo de Ĉina Popolo.

De la fino de 1935 ĝis la fino de 1947 li estis en Norda Ŝensi. Tie li gvidis la Rezistmiliton kontraŭ

Japanio kaj la Popolan Liberigan Militon, kiu renversis la reakcian reĝimon de Kuomintang. En 1934 kaj refoje en 1944 li estis elektita Prezidanto de la Politika Buroo kaj de la Centra Komitato de la Ĉina Komunista Partio. En 1945 post la Sepa Tutlanda Kongreso de la Partio, li estis denove elektita Prezidanto de la Centra Komitato de la Ĉina Komunista Partio.

En 1949, kiam fundamenta venko estis akirita en la Ĉina Popola Liberiga Milito, li elektigis Prezidanto de la Centra Popola Registaro de la Ĉina Popola Respubliko fare de la Politika Konsilia Konferenco de Ĉina Popolo, kunvokita en Pekino. Li estis ankaŭ nomita Prezidanto de la Revolucia Milita Konsilo de Ĉina Popolo fare de la Centra Popola Registaro.



Prezidanto Mao Ze-tung, en 1945, kiam li faris en Jen-an la faman raporton "Pri Koalicia Registaro" en la 7-a Tutlanda Kongreso de Ĉina Komunista Partio

La Ĉina Komunista (daŭrigo)

Komercaj rilatoj inter la urbo kaj kamparo kaj inter Ĉinio kaj fremdlandoj, kiujn strangolis 12 jaroj da milito, nun restariĝis. La tuta valoro de nia eksterlanda komerco en 1950 superis tiun de iu ajn jaro de post la Incidento de la 18a de septembro en 1931, kiam la japanoj okupis Nordorientan Ĉinion.

Estis ankaŭ la unua fojo en 73 jaroj, ke Ĉinio havis favoran komercan bilancon.

Suvereneco super la doganoj, soife dezirita de la popolo de post 1842 nun plene establiĝis. La imperiistoj nun blokadas la eksterlandan komercon de Ĉinio, sed la plejparto de la eksterlanda komerco de Ĉinio jam ne plu estas kun la kapitalistaj landoj, sed kun Sovetunio kaj la Novaj Demokratioj.

5. La ŝtato investis en ekonomia restarigo. La Centra Registaro establiĝis antaŭ nur malpli ol du jaroj, kaj tial ĝiaj financoj ankoraŭ ne permesas iun grandskalan ŝtatinveston. Tamen, la jara tuta valoro de ŝtataj ekonomiaj investoj, en ambaŭ 1950 kaj 1951, superas tiun de iu ajn jaro sub la Kuomintanga regado. Niaj investoj estas ĉefe sur fervojoj, akvokonservo kaj peza industrio. Ĉiuj fervojoj sur la ĉeftero krom 9 procentoj jam ripariĝis kaj malfermiĝis al trafiko. Novaj fervojoj estas konstruataj. Koncerne inundojn kaj senpluvecon suferatajn de la ĉinaj kamparanoj, la tuta valoro de ŝtataj investoj kaj pruntodonoj en agrikulturo kaj akvokonservo dum la lastaj du jaroj multe superas la tutajn sumojn kiujn la Kuomintanga reĝimo elspesis ciflanke dum la 22 jaroj de sia ekzisto. Peza industrio estas restatiganta. Du jaroj da ekonomia investo fare de la Centra Popola-Registaro elvokis en la tuta lando ĝeneralan senton ke ĉi tiu estas la nura registaro servanta al la popolo kaj ke nur ĉi tiu registaro kapablas gvidi la ĉinan popolon al feliĉo.

Nia popolo havas senliman fidon en ekonomia konstruo. Ni havas 475 milionojn da diligentaj kaj laboremaj popolanoj, kaj sennombrajn naturprovizojn. En la efektivigo de ekonomia konstruo la ĉina popolo estas gvidata de la longe provita Ĉina Komunista Partio kaj Kamarado Mao Ze-tung kiu estas riĉe dotita per la granda saĝo de marksismo kaj leninismo. La ĉina popolo kredas ke ili sukcese entreprenos ekonomian konstruon ĝuste kiel ilia armita lukto sukcese renversis la reakcian reĝimon de la imperiistoj kaj Kuomintang.

La fina celo de la progreso de nia lando estas socialismo kaj komunismo, ĉar ili estas la plej bonaj sociaj sistemoj por la homaro. Nia popolo batalas

por la realigo de la socialisma kaj komunisma sociaj sistemoj. Sed por atingi la celon de socialismo kaj komunismo, ni devas trairi la nunan etapon—la etapo de nova demokratio—kaj ne ĝin transalti. La naturo de ŝtatpotenco en la nuna etapo estas la popoldemokrta diktatoreco gvidata de la laborista klaso, bazita sur la alianco de la laboristoj kaj kamparanoj kaj unuiganta ĉiujn demokratajn klasojn kaj ĉiujn naciojn en la lando. La ekonomian komponon en la nuna etapo karakterizas la konekzisto de kvin specoj de ekonomio: ŝtatfunkciata ekonomio, kooperativa ekonomio, la individua ekonomio de kamparanoj kaj metiistoj, privata kapitalisma ekonomio kaj ŝtata kapitalisma ekonomio, gvidataj de la ŝtatfunkciata ekonomio kiu estas socialisma en naturo.

Al ĉiu el la kvin specoj de ekonomio devas esti donata la eblo ludi sian plenan parton kaj ĉiu el ili ne devas kolizii kun sed konformigi al la ĝeneralaj planoj de la pli gravaj branĉoj de nacia ekonomio, publikaj kaj privataj. Ĉar estas malsamaj sistemoj de posedo en la entreprenoj, malharmonio nepre okazas. Tamen ekzistas du favoraj kondiĉoj. Unue, nia lando ne estas nur gvidata de la laborista klaso en la politika sistemo de la popoldemokrta diktatoreco, sed ankaŭ gvidata ekonomie de la ŝtatfunkciata ekonomio kiu estas socialisma en naturo. La progreso de nacia ekonomia konstruo ne malfortigos, sed ege plifortigos la ŝtatfunkciatan sektoron de la nacia ekonomio. Tial, ni firme kredas, ke ekonomie, same kiel politike, la ŝtatfunkciata sektoro de la nacia ekonomio, kiu estas socialisma en naturo, havos suŝican forton por gvidi la aliajn sektorojn de la nacia ekonomio en kunordigita ago. Due, la privatkapitalisma sektoro de la nacia ekonomio jam sentis kaj daŭre sentos, ke sub la novdemokrta ŝtatpotenco, iliaj ŝancoj por disvolvigo ne malpliigos sed ege pliiigos, kompare kun la tempo de imperiista aŭ Kuomintanga reakcia regado, ĉar ili estas protektataj kontraŭ la ekonomia agreso de la imperiistoj kaj la enlanda merkato estas senprecedenca en amplekso. Tial, ili ankaŭ subtenas ĉi tiun ŝtatpotencan kaj en konvenaj kondiĉoj povas konformigi kun la nacia ekonomia plano.

La 30-jara Ĉina Komunista Partio—la politika partio de la ĉina proletaro—gvidis la ĉinan popolon renversi la imperiista-kuomintangan reakcian regadon en 28 kaj duona jaroj da lukto kaj post tio denove gvidis dum unu kaj duona jaroj en landa konstruo. Nacia ekonomia konstruo estas nova speco de laboro por ni. Ni devas pene lerni. Sed ni firme kredas, ke nia partio sub la gvido de Kamarado Mao Ze-tung triumfe konstruos nian landon ĝuste kiel ĝi triumfe renversis la imperiista-kuomintangan reakcian regadon en armita lukto. Por sin liberigi kaj konstrui sian landon, la ĉina popolo, provinte ĉiun vojon kaj ĉiujn gvidantajn grupojn en la pasintaj cent jaroj, fine elektis la Ĉinan Komunistan Partion.

Nova Sporto por la Popolamaso

—Tutĉinia Korbopilka kaj Volejbola Konkurso—

Cau Ŝi-Cen (曹錫珍)

I

La Tutĉinia Korbopilka kaj Volejbola Ĉampioneca Konkurso de 1951, kiu okazis en la ĉefurbo de la 4a ĝis la 16a de majo kaj kiu estis la unua tutlanda sporta kunveno de post la fondiĝo de nova Ĉinio, bone fiksis la fundamenton de popola gimnastika movado por la nova Respubliko.

La celo de la konkurso estis duobla: unue igi korbopilkon kaj volejbolon konstantaj kaj disvastigitaj popularaj sportoj de la popolamaso por ke la populara gimnastika agado de la popolo por la servo de nacidefendo kaj produktokonstruado estu unu paŝon pluen disvolvita, kaj due elekti la geludantojn por la viraj kaj virinaj korbopilka kaj volejbola teamoj de Ĉinio partoprenontaj en aŭgusto la Mondan Feston de Junularo kaj Studentoj por Paco en Berlino. La sportkunvenon partoprenis 593

sportistoj el 8 unuoj, nome, Sportistoj el la ses grandaj Administraj Regionoj de Nordĉinio, Orientĉinio, Centrosudo, Sudokcidento Nordokcidento kaj Nordoriento tiuj de la Popola Liberiga Armeo kaj la Ĉina Fervoja Sindikato. La sportistoj ampleksis laboristojn, terkulturistojn, komandantojn kaj batalantojn de la Liberiga Armeo, studentojn, instruistojn, gimnastikistojn, komercistojn kaj industriistojn, kaj inter ili troviĝis mahometanoj, mongolaj, uzbekaj, uĵuraj, tartaraj, koreaj, rusaj kaj hazakaj fratnacionoj kaj revenintaj transmaraj ĉinoj.

II

Dum la dek tri tagoj de la kunveno, entute okazis 130 konkursoj el kiuj neniu teamo iam rezignis sian rajton, nek okazis ia ajn malagrabra kverelo. En la pasinteco la Kuomintangaj reakciuloj ankaŭ okazigis tiajn konkursojn kiel tutlandaj sportkunvenoj k.s., sed ili estis nenio alia ol politikaj ornamadoj, kaj en tiaj konkursoj okazis de tempo al tempo ke sportistoj ial interbatalis, aŭ la juĝanto estis vundbata, aŭ iu teamo rezignis rajton dumlude. Sed la nunaj sportistoj kiuj estis ricevintaj novdemokratian edukadon klare komprenas ke la celo de la sportludoj estas plifortigo de la korpo, kiu estas siavice por servi al nacidefendo kaj produktokonstruado. Tial en la daŭro de la tuta kunveno, la sportistoj plene manifestis sian altgradan organizitecon kaj disciplinon. La enhavo de ilia serioza tamen agrabra vivo estis pliriĝigata per konvenaj sinamuzoj, lernado pri la kurantaj eventoj kaj studado kaj diskutado pri pilkoludaj artoj. Dum la konkurado ili absolute obeis al la juĝanto kaj en kazo de regul-rompo ili konfesis honeste per manlevo; la tĝamanoj en- kaj el-iris la sportejon kolektive, forigante la pasintan senorganizan sinteniĝon; kaj post ĉiu konkurso la membroj de ambaŭ venkinta kaj venkita teamoj reciproke manpremis kaj ĉirkaŭbrakumis, laŭte kriante, "Lernu de la rivala teamo!" kaj "Saluton al la rivala teamo!"

La konkunduko de la internaciaj konkursoj estis ankaŭ unu el la riĉaj rikoltaĵoj de la ĉefurba sporta kunveno. En la tempo sub la reakcia regado de Kuomintang, la korbopilka regularo de nia lando sekvis tiun de Usono kaj la volejbola tiun de la Malproksimorienta Olimpia Konkurso. Je la antaŭa kazo tio plene reflektis la Usonadorismon de la sporta rondo sub la reakcia regado kaj je la lasta kazo tio estis pro la tiel nomata "konformiĝo al korpa forto". La ĉifoj adopto de la internaciaj regularoj por ambaŭ ne nur simple montris nian progreson en pilkluda tekniko, sed precipe ĝi ankaŭ havas gravan politikan signifon. Laŭ la vidpunkto de tekniko, la Usona korbopilka regularo estas postigita kaj putreca; la plej elstara ekzemplo estas ke ĝi permesas kvin fojojn de persontruda regul-ofendo (dum la internacia regularo nur kvar), alivorte ĝi

(daŭrigota sur p. 58)

konstrueblaj tuneloj. Nun pli ol 65% el ili estas kompletigitaj.


La armeanoj, kamapanaroj, laboristoj kaj la inĝenieroj, ĉiuj laborantoj por konstruado de la fervojo plene konscias, ke la nacia konstruo signifas ne nur la feliton kaj abundon por ilia vivo, sed ankaŭ garantian al la sekureco de la patrio, kiun la imperiistoj ĉiam minacas per ĉiuj intrigoj. Tial ili elkrias la sloganon: "Kie ni laboras, tie estas fronto por kontraŭbatali la Usonajn imperiistojn." Nun en la orienta parto la laboristoj garantias, ke la fervojo finkonstruiĝos ĉijare ĝis Neĵiang 232 kilometrojn okcidente de Ĉungking (重慶). Same la laboristoj okcidente de Neĵiang klopodas por ke ili konduku la vagonaron en 1951 ĝis Zeĉung (齊中) 33 kilometrojn for de Neĵiang. Kaj en la plej okcidenta parto la laboristoj havas plenan memfidon ke ili povos finkonstrui la fervojon 184-kilometre longan de Zeĉung ĝis Ĉengtu en 1952.

Subtenate de la tutlanda popolo kaj intima kunlaboro de la armeanoj, kamapanaroj kaj inĝenieroj kredeble tiuj garantioj efektiviĝos akurate aŭ antaŭ la difinita dato. Ni do vidu la kreskon kaj ekpulsadon de la

granda arterio de Sudokcidenta Ĉinio.

—Honfan

* Ĉuke Liang estis lerta taktikisto en antikva Ĉinio (en 17a jarcento). Tie ĝi signifas, ke se oni povas bone interkonsiliĝi, ĉiu povas esti Ĉuke Liang.



Nova lokomotivo elsiĝas ĉe la kajo de Ĉungking.

Bovpaŝtistoj Kaj Teksistinoj

loĝantoj sub Luŝanpo, la Komunista Partio vere estas dia bovo, dank' al kiu ne nur la bovpaŝtistoj kaj teksistinoj de la vilaĝo levigis, sed ankaŭ Luŝanpo, la maljuna kaj kalva monteto.

Antaŭ la liberiĝo, neniu volis supreniri la monteton por porti la griznigran teron. Se li iom pli multe rikoltis, li ne nur nenion povis gajni, sed eĉ devis malprofiti ekspluatate de la bienulo per repreno de la farmo aŭ plialtigado de la ter-luprezo. Tiam la tagoj estis vere mizeraj. Krom la subpremado kaj ekspluatado de la bienuloj kaj lokaj tiranoj, ŝarĝiĝis sur la malriĉaj kamparanoj tieaj ankaŭ banditoj kaj la 13-a Armeokorpuso de Tang En-po (湯恩伯) unu el la Kuomintangaj militristoj) kiuj elĉerpis vilaĝon post vilaĝo per okupado kaj senpaga manĝado. Plie, ĉiujare okazis aŭ trosekeco aŭ inundo. Pro tio la kamparanoj ofte suferis malsaton. Eĉ en jaro de abunda rikolto, mankis al ĉiu kamparana familio nutraĵo por 6-7 monatoj, dum kiuj oni povis manĝi nur ulmoŝelon, Kuanĵin-teron (speco de argilo), fekaĵojn de ostaroj*, kaj branon kun sovaĝaj legomoj.... Eĉ la buŝon kaj la stomakon oni ne povis satigi, kiel oni povis havi humoron por produktado!

La vilaĝoj restas la samaj vilaĝoj kiel antaŭe, kaj Luŝanpo aspektas senŝanĝa de miloj da jaroj, sed post la agrara reformo la homoj loĝantaj sub la monteto ege ŝanĝiĝis. Oni pelas sian amatan bovon plugante sur sia propra tero; kaj ŝpiniloj senĉese knaradas. Kvankam diferencas la ampleksoj de la vilaĝoj kaj la alteco de la vilaĝo-muroj, tamen ili pleniĝas de komuna atmosfero—atmosfera de nova vivo.

En ĉiu korto staras unu aŭ du altaj stakoj de maiztrunketoj, kaj dekstre kaj maldekstre staras staloj. Ĉe ambaŭ flankoj antaŭ la korta pordo sidas grandaj amasoj da fekunda kaj nigra tero kaj bov- kaj ĉeval-fekaĵoj, kaj freŝruĝa versduo*

surluĝis sur la pordo. La muroj estas kovritaj de ĉenoj da maizo, kapsiko, kaj rafano, el kiuj iuj estas uzotaj kiel semoj kaj aliaj konservataj por manĝi. En ĉambroj greno kaj pluginstrumentoj pleniĝas. Ĉiu familio konservas grenon sufiĉan por la konsumado por la tuta jaro (iuj eĉ por du jaroj). Plenkreskuloj, infanoj, viroj, virinoj, ĉiuj vestas sin en novaj vatitaj vestoj kaj ĝojplene ridas. Malsaton ili jam forpelis fore kaj neniam ĝi povos denove reveni.

Feliĉo kaj abundeco estas nedisigiblaĵoj de diligenteco. La kamparanoj ne nur pene laboras dum sezonoj plenaj je agrikulturaj laboroj, laŭeble kulturis la virgan teron, sed eĉ en la vintro ili ne ripozas. Tuj post la tagiĝo ili suriras la monteton por alporti griznigran teron almenaŭ 8 aŭ 9 fojojn ĉiutage por prepari fekundajon de la kampoj. La virinoj ankaŭ organiziĝas por ŝpinado kaj teksado. Krome estas organizitaj transportaj trupoj inter la najbaraj urboj. Nur per la lasta metodo ili akiris dum unu monato en oktobro pli ol mil kilogramojn da maizo.

Kaj tamen riĉiĝo de diligenteco estas ne realigebla sen la Komunista Partio. Sepdek-jara Onklino Ĉang (張) diris: "Sen la Komunista Partio, kiom ajn abunda estus la rikolto, ni nenion povus gajni, ĉar ĉion elsuĉus la bienuloj."

La labor-modelo Liŭ Feng-ing (劉鳳英) havas familion de naŭ personoj. Dum la reakcia regado de Kuomintang ŝi farmis 22 muojn da tero de bienulo Sung Ŝu-ĵen (宋樹仁) de Siĉaj-Vilaĝo (西寨村). Ŝi rikoltis 22 sakojn da tritiko, sed al la bienulo ŝi devis doni 14 sakojn kiel lupagon kaj interzono de la 1½ sakoj pruntitaj. Ankorau du sakojn ŝi bezonis por pagi la diversajn impostojn kaj rikoltempajn dungiĝojn. La neta rezulto estis nur 4 sakoj da tritiko, kiom sufiĉis por la 9-membra familio nur 3 monatojn, ne enkalkulante la fojn bezonon de la du bovoj.

Dum aŭtuno, 6 el la 22 muoj estis kovrataj de akvo kaj sekve nesem-

blaj; la ceteraj 16 muoj povis produkti ĉirkaŭ 12 sakojn da maizo kaj verda fazeolo. Sed la bienulo ankaŭ deprenis duonon el ili. Tiel, ĉiujare mankis al ŝia familio nutraĵo almenaŭ por duono da jaro.

Tamen, post la agrara reformo ŝi kun ŝia familio ricevis 23 muojn da kulturita tero kaj tri kaj duonon da ĉambroj. Pro fekundiĝo de la kampoj kaj pro forigo de inundo en lasta jaro ŝi rikoltis entute 50 sakojn da greno. Krom pago por la sola agrokultura-imposto apartenas al ŝi la tuta restaĵo kiu sufiĉas por la vivtenado de ŝia familio por pli ol 2 jaroj. Do, nur post unu jaro ŝia vivo tute aliĝis.

Tiajn liberiĝintajn kamparanojn kia Liu Feng-ĵen, oni povas trovi sufiĉe multajn ĉe Luŝanpo. Pasintaj jaroj en Ĉangĉuang-Vilaĝo kun malpli ol 200 familioj, oni nove aĉetis 10 bovojn, 9 azenojn, 1 ĉevalon kaj 1 mulon. Nun la vilaĝo havas jam 128 brutojn: preskaŭ 1 por du familioj.

Por defendi la feliĉan vivon, ĉe Luŝanpo ankaŭ varme kaj alte ondiĝas la movado por Koreio kontraŭ la agreso de Usono. Iuj junaj fratoj konkuris por esti volontulo sur korea fronto kaj ili devis peti la arbitracian de la patrino. La virinoj kaj knabinoj plendis, ke oni ne donas al ili ŝancon por batalo kontraŭ Usona agreso. Por ĉiuj, ankaŭ por ŝi mem, la liberiĝintaj kamparanoj brave kaj konkure marŝas al la plej antaŭa defenda fronto de la patrolando.

Nun, la bovpaŝtistoj kaj teksistinoj ĉe Luŝanpo jam liberiĝis, feliĉe vivas, kaj ne plu revas iri sur la ĉielon. Ili ĝoje konstruas per siaj propraj manoj paradizon sur la tero, kaj ĝin defendas per siaj sango kaj karno, malpermesante invadon de iu ajn diablo.

Tradukis Jungsen

* sovaĝa ansero

‡ versduo skribita sur du pecoj da ruĝa papero por ornamo la prodojn ktp.

Ĉinaj Laboristoj Sur la Kultura Fronto

Ĉeng Ŝiaŭ-feng (鄭笑楓)



La lernantoj en Teknika Lernejo por Gejunuloj aŭskultas klarigon de la instruisto antaŭ praktiko en la fabriko.

En la pasinta jaro, landskale la laboristoj jam venkis la unuan batalon sur la fronto de lernado. La Tutĉinia Federacio de Laboristoj okazigis 15-25 apr. en Pekino Tutlandan Konferencon de Kultura kaj Eduka Laboroj de la Sindikatoj, el kies ĉefaj diskutemoj unu estis kiel pli vaste kaj energie disvolvi la postlaboran edukadon inter laboristoj. La konferenco klare rimarkigis: plialtigi la nunajn kulturajn, politikajn kaj teknikajn nivelojn de laboristoj ke ili fariĝu kadroj en la komencita ekonomia konstruado, estas nuntempe urĝa tasko. La konferenco rezolucis, ke ĉiuranga sindikato klopodu landskale en la kuranta jaro varbi 1,500,000 laboristojn kaj oficistojn al sin-

rigado, kaj ĉiu institucio faru por si planon por senigi analfabetojn.

Depost la pasintseptembra Tutlanda Konferenco de Laborista kaj Kamparana Edukado, la nombro de industriaj laboristoj en la grandaj urboj, kiuj partoprenis klerigadon multe pligrandigis. Laŭ nekompeta statistiko, en septembro de 1950, en la grandaj distriktoj, la

proporcio de la nombro de lernantaj oficistoj kaj laboristoj rilate al la nombro de la tuta oficistaro kaj laboristaro estis 9.13% en Norda Ĉinio, 16.10% en Nordoriento, 5.60% en Nordokcidento, 5.46% en Orienta Ĉinio, 2.87% en Centrasuda Ĉinio, kaj laŭ la statistiko en la fino de decembro 1950, en Sudokcidento la proporcio estis 4.41%.

Sed en marto de la kuranta jaro, la proporcio meznombro pligrandigis je 3.67% ol tiu en la pasinta septembro. Ĝi estis en la tuta lando 10.69%, i. a. 15.11% en Norda Ĉinio, 20.75% en Nordoriento, 9.92% en Nordokcidento, 8.97% en Orienta Ĉinio, 4.90% en Centrasuda Ĉinio, kaj 10.55% en Sudokcidento.

La ĉefa kaŭzo de tio ke dum tiu mallonga tempo de duonjaro oni povis akiri tiom grandan atingon estas: unuflanke la vasta laboristaro urĝe aspiras esti klerigita por plibonigi sian produktan teknikon; kaj aliflanke, precipe post la Tutlanda Konferenco de Laborista kaj Kamparana Edukado, klarigis la direkto por disvolvo de laborista kaj kamparana edukado, kaj la lokaj popolaj registaroj rigardas la disvolvon de laborista kaj kamparana edukado unu el siaj gravaj taskoj kaj laŭplane gvidas la laboristojn sin klerigi.

La postlabora edukado por laboristoj komenciĝis jam en la jaro 1949 en Nordoriento. Ĝia landskala disvolvo komenciĝis laŭplane de 1950.

Komence, en aprilo de 1950 la Tutĉinia Federacio de Laboristoj okazigis kunsidon por postlabora edukado de naŭ urboj inkluzive de Pekino, Tienzino, Ŝanhajo, Hankoŭ, k.c. por interŝanĝi siajn opiniojn. La 1-an de junio la Administra Konsilo publikigis "instrukeion por la disvastigo de laborista postlabora edukado" kaj decidis la principon ke klerigado kaj legolernado estu la fundamento de la laborista postlabora edukado. La

Administra Konsilo ĵinkvis likvidi en 3-5 jaroj la plejparton de analfabetoj inter industriaj laboristoj. Tuj poste ĝi okazigis en septembro Tutlandan Konferencon de Laborista kaj Kamparana Edukado, plikonkretigis la principon kaj taskon de la postlabora edukado kaj emfazis ke tiu edukado devas kunligi kun politiko kaj produktado, kaj antaŭenmarŝi paŝon post paŝo kaj progresi sur firma bazo. Samtempe la Konferenco klare montris, ke nuntempe la ĉefa objekto de la postlabora edukado estas la kadroj kaj aktivuloj en industriaj kaj minaj entreprenoj.

La Tutlanda Konferenco de Kultura kaj Eduka Laboroj de la Sindikatoj kiu okazis 15-25 apr. ĉi-jare, resumis la spertojn en la pasinta jaro kaj plie montris ke la postlabora edukado ne estas simpla izolita klerigado sed devas intime kunligi kun produktado kaj politika edukado, kaj ke la administracioj de industriaj kaj minaj entreprenoj devas bone utiligi ĉi tiun edukadon por antaŭenpuŝi la produktadon. La konferenco rezolucis, ke por garanti la plenumon de la tasko donita de la Administra Konsilo "fundamente likvidi en 3-5 jaroj la analfabetecon de industriaj laboristoj", oni devas fari demokratian planon, kaj starigi sistemon de kontrolo kaj promocio per ekzameno; por la disvastigo de la postlabora edukado.

Prezidanto Maŭ diris: "Likvidi la analfabetecon de la 80% el la ĉina popolo estas nepre necesa kondiĉo por la konstruado de nova Ĉinio." Kiom da analfabetoj nun troviĝas inter la industriaj laboristoj? Ankorau ne ekzistas ĉe nekompeta statistiko, sed la nombro estas certe sufiĉe granda. Laŭ la proksimuma kalkulo en 1949 j., analfabetoj konsistis 80% el la tutlandaj ministoj kaj 30% el la fervojistoj.

Post la disvastigo de la postlabora edukado inter laboristoj, tiu stato rapide ŝanĝiĝas. Ekz. en Nordoriento, la koncentra regiono de minejoj, en 1949 j. 82% el la ministoj estis analfabetoj kaj duonanalfabetoj. Sed post unujara klerigado, la nombro de analfabetoj malaltiĝis ĝis 61.50%. Laŭ la plano, ĉi-jare malaperos ankoraŭ 20%, kaj la analfabetecon estos tute likvidita en 1953 j.

En la distrikto de Port-Arturo kaj Dajren la likvido de analfabetecon progresas pli rapide. En marto de 1949, 70% el la industriaj laboristoj estis analfabetoj antaŭ la komenciĝo de la postlabora edukado por oficistoj kaj laboristoj, sed en marto de la kuranta jaro restis nur 30%.

De la pasinta junio Tajĵuan-a Maŝin-fabriko komencis la postlaboran kulturan edukadon inter la oficistoj kaj laboristoj, kaj post malpli ol unu jaro, multaj laboristoj kiu antaŭe konis nur kelkajn ideografojn, nun scipovas legi, skribi kaj kalkuli.

Multaj laboristoj memkonscie prenis sian klerigadon kiel politikan taskon. Precipe en la patriotisma movado helpi Koreion kaj rezisti Usonon, la oficistoj kaj laboristoj ĝenerale despli alte taksas sian klerigadon. La oficistoj kaj laboristoj en multaj fakoj de Fuŝun Minejo proponis: se analfabeto ne volas partopreni en lernado, li ne povas esti alkalkulata al la vico de taskoplenumintoj, ĉe se li plenumis sian taskon en la produktado.

Nova Sporto..... (daŭrigo de p. 57)

kuraĝigas la ludantojn ofendi regulojn anstataŭ disvolvi sian teknikon al pli alta nivelo. En la volejbola konkurso ni adoptis la internacian regularon de 6 ludantoj, ĉar la ses ludantoj interŝanĝas siajn poziciojn en la ludado, sen diferenco de la antaŭa, meza kaj malantaŭa vicoj, tiamaniere, ke ĉiu devas esti sperta en servo, premo kaj baro, kio multe superas la tiel nomatan Malproksim-orientan Regularon de naŭ personoj en tri vicoj. Plie por la virina korbopilka konkurso ni adoptis la viran regularon. Tion ni povas nomi la emancipa movado de ĉina virina korbopilka ludo.

Ĉiuj partoprenantoj de la Kunveno estis la plej eminentaj ĉinaj gejunuloj, inter kiuj troviĝis anoj de la Komunista Partio kaj la Novdemokratia Junula Ligo, kaj ankaŭ laboristoj, ekzemple Pa Zo-ŝiang (巴作相) de la Nordorienta Volejbola Teamo estas labor-modelo de Anŝan Fer- kaj Ŝtal-uzino (鞍山鋼鐵廠) en Nordoriento. Kontraŭe la sportistoj en la tempo de Kuomintang estis plejparte profesiaj ludantoj, kiuj estis laŭnomaj lernantoj kaj oficistoj.

La teknikaj niveloj de ĉiuj teamoj estis senĉese plialtigitaj ĝenerale. Ekzemple, en la ludo de korbopilko, preskaŭ ĉiu ludanto kapablis suprensaltante ĵeti pilkon unumane kaj libere apliki diversajn metodojn en defendo kaj atako. La 6-persona volejbola ludo estis ankaŭ iom post iom ellernita ĝis sufiĉa lerteco. Plej mirinde estas, ke la ludarto de multaj teamoj akiris rimarkindan progreson ĉe dum la konkursa periodo.


La Popolarmeaj Korbopilka Teamo ludis pli kaj pli lerte, kaj la Sudokcidentaj kaj Nordokcidentaj viraj kaj virinaj korbopilkeamoj ĉiam eksperimentis la duan tagon en la aktuala konkurso kion ili lernis ĵus en la antaŭa tago. Sekve la interfluo de teknikaj spertoj estis ankaŭ unu el la ĉefaj rikoltitaĵoj de la kunveno.

III

La nova sperto devas esti popolamasa sporto ĉefe por la laboristoj, kamparanoj kaj armeanoj. La fakto ke granda kvanto de la partoprenantoj en ĉi tiu kunveno estis laboristoj, terkulturistoj kaj batalgvidantoj de la Liberiga Armeo jam pavisis glatan kaj larĝan vojon por la disvolvo de la sporto por laboristoj, kamparanoj kaj armeanoj en Ĉinio.

La reprezentantaj teamoj de la ses grandaj, Administraj Regionoj entenis grandan nombron da laboristoj, kaj tiuj de Fervoja Sindikato konsistis pure el laboristoj; en la reprezentantaj teamoj ambaŭ de Orienta Ĉinio kaj la Centrasudo troviĝis kamparanoj; kaj la pilkludaj teamoj de la Popola Liberiga Armeo fermis unuj el la ĉefaj fortoj en la konkuranta tendaro. Estis tre signifoplene ke la kunveno kalkulis la Fervojan Sindikaton kaj Liberigan Armeon en la 8 konkursantajn unuojn. Tio montras ke la ĉina sporto estas disvolviĝanta firme kaj definitive inter la laborista klaso kaj armeano.

Laŭ la rezultoj de la konkursoj de la laboristaj, kamparanaj kaj armeaj unuoj, ni povas klare vidi ke ilia



gimnastiko jam havas sufiĉe bonan bazon. La vira korbopilka teamo de la Fervoja Sindikato venkis kvin el la sep konkursoj, la virina korbopilka teamo de la Popola Liberiga Armeo rangis dua en la virina korbopilka konkurso, kaj la vira volejbola teamo de Centrasudo, kies ĉefan forton formis tri kamparanoj kaj unu veturistigo de trirada pedalaro, honore atingis la kampionecon el la konkurso. Tiaj brilegaj rekordoj kiujn ĉinaj laboristoj, kamparanoj kaj armeanoj povas atingi en la tutlanda kunveno estas ja senprecedencaj en la sporta historio de Ĉinio.

IV

La Kampioneza Konkurso estis sukcesa, rikoltiĉa kaj triumfa. La nova sporto de nova Ĉinio nepre devas heredi la rikolton kaj spertojn de ĉiĵoja kunveno kaj bona fundamento por plua disvastigo de popola gimnastiko kaj konstante disvolvi ĝin pli vasten kaj profunden.

La direkto de la nova sporto de Ĉinio estas por la popolamaso, kaj ĝia estonteco estas sendube brilega kaj vivoplena.

Tradukita de Nojo Lo

(daŭrigota sur p. 60)

Vejev (魏捷)

Mi Ja Ĝojas Pro Tio

Rakonto de Ĉina Junulino sur Korea Fronto

Iuvespere, dum la marŝado mi iris kune kun unu kamaradino. Ŝi estis ne altstatura, ŝajne nur 16-17-jara. Ŝi portis sur la dorso sakon de sekigitaj manĝaĵoj kaj krome ankaŭ *erhuon* (ĉinan violonon). Du malgrandaj harplektaĵoj pendantaj de sub la kepo pendole svingiĝadis dum ŝi marŝis vigle kaj facilmove, kaj ŝi ion kantis mallaŭte.

"Ĉu vi estas laboranto de la arta labor-grupo?" demandis mi. "Jes," ŝi respondis, kaj diris al mi ke ŝi ĵus revenis de la 1-a bataliono, kie ilia grupeto restis 4 tagojn. Dirinte, ŝi ree daŭrigis kanteti mallaŭte.

Mi interrompis ŝin per refoja demando:

"Kion vi faris dum la 4 tagoj?"

"La unuan tagon ni kolektis verajn heroajn rakontojn, la duan ni verkis dramon el la krudaj materialoj, la trian ni provludis la dramon kaj la kvaran ni ĝin ludis publike. Hodiaŭ ĵus fininte la prezentadon ni ekmarŝis de tie; vidu, mi ĉe ne havis tempon por forlavi al mi la ŝminkaĵon!" tion dirinte ŝi ekridis brue; eble por ke mi ne vidu la olekolorojn sur ŝia vizaĝo, ŝi rapide ekprenis manplendon da neĝo kaj komencis fronti per ĝi sian vizaĝon.

Mi ekiris pri tia batalanta labormaniero kaj mi laŭdis pri tio.

"Ja tre kruda estis tia verko!..." ŝi diris, "sed, ni pensis ke sufiĉas se nur ĝi efikas. Imagu al vi, la batalantoj ja ne havas libertempon por atendadi ĝis pretiĝo de via brodaĵo. Tial, ni devis fari la ne tre temporabajn kaj simplajn. Se ne troviĝas lampo, ni do ludas en lunlumo. Se ne troviĝas teatro, ni prenas korton aŭ grenkampan kiel scenejon. Kaj dum la marŝo ni kantas kaj rakontas al la batalantoj".

"Ja multon vi jam faris en la artista servo!"

"Ne nur en la artista! Ni ja faras ĉion, kio venas en niajn manojn. Mi iam fariĝis ankaŭ arma kuiristino!"

"Armea kuiristino?"

"Jes, sur la fronto, la kuiristoj estas ja sufiĉe okupataj; ili devas transporti jen manĝaĵojn, jen akvon, kaj ankaŭ la municion ili devas transporti. Mi vidis ke ili estas tro okupataj, tial mi petis la permeson fariĝi kuiristino. Kaj krome mi ankaŭ..."

"Nu, kio?"

"Mi ankaŭ laboris dum du monatoj kiel pelotonestro en la barako de militkaptitoj!"

Pririgardante ŝian malgrandan staturon kaj la naŭvan mienon dum la parolado, mi ekridis pretervole.

"Kion vi priridas?" serioze ŝi diris. "Ili ja estas tiel altstaturaj, tamen ĉu ili kuragiĝis min ne obei? Se mi ordonis ilin stari,

ili certe ne kuragiĝis sidiĝi!"

Mi ne plu kuragiĝis laŭte ridi, sed ridis en la koro. Tiam, subite eksonis la fajfilo, kaj la trupo komencis ripozi. Jen, post palpebrumo ŝi jam malaperis. Iom poste, aŭdiĝis de sur malproksima roka krutaĵo ŝia ĵuna kaj klara voĉo:

"Kamaradoj! ni kantu, ĉu bone?"

"Bone!" ĉiuj aprobis en la malsupro, kaj ekkantis.

En la lumradioj de malamikaj serĉlumigiloj sur la transa bordo de Han-rivero, ŝiaj brakoj facilmove svingiĝadis markante la taktojn de la melodio.

Tuj post la finiĝo de la kanto ŝi revenis kun du tasegoj da malvarma akvo elĉerpita el rivereto; unu tasegon ŝi donis al mi, kaj la alian ŝi eltrinkis englute. Tion farinte ŝi interplektis la manojn post sian kapon kaj kuŝiĝis surdorse por ripozi. La du malgrandaj harplektaĵoj tuŝis la neĝon nedegelintan.

Pretervole mi droniĝis en penso: antaŭ duona aŭ unu jaro, ili ankoraŭ estis dorlotataj infanoj ĉe la gepatroj, kaj delikataj lernantoj en la lernejoj. Ili povus tiam terurigi ĉe pro malgrava vundigo de amikina fingro per tranĉileto, kaj maltrankviligi pro malkuligo de sia nova vesto, sed nun estas tiel aplombaj kaj gajaj en la loko nur kelkajn kilometrojn for de la fronto, kaj faras multajn laborojn sur la plej

kruala kaj furioza batalkampoj de la tuta mondo. Kia mirindaĵo tio ĉi estas! Mi diris kortuŝite:

"Kamaradino! Kiel vi povas progresi tiel rapide?"

"Nu, dank' al la eduko de la partio, kaj ankaŭ la firma decido de ni mem."

"Kaj kio estas via decido?"

"Mia decido..." ŝi ridis honteme, rigardante siajn piedojn, kaj ekhaltis. Nur post longa paŭzo, ŝi ree ekparolis:

"Ankaŭ simila al tiu de la aliaj!"

"Do, vi decidis partianigi?" ŝi ekridis.

Tiam, eksonis la fajfilo, kaj la trupo denove antaŭen marŝis. Ŝi forskuis la neĝon de sur la hararo kaj ree ni marŝis kune.

"Tamen, estas ankoraŭ alia grava kaŭzo, ke ni povas rapide progresi," ŝi diris. "Ni ĉiam kunvivis kun la batalantoj, la herooj, kaj sekve ankaŭ ni mem fariĝas kuraĝaj." Ŝi komencis babili kun granda intereso: Post la forlaso de la patrolando, ŝi sentis en la komenco, ke ŝi estas peze ŝargita kaj iris malfacile; sed ekvidante ke la batalantoj portas pli multe ol ŝi, kaj tamen kantas kaj rakontas dum la marŝado, ankaŭ ŝi mem iris pli facile. Kiam la malamikaj aeroplanoj jetis lumigajn bombojn, ŝi teruĝiĝis, sed la batalantoj diris: "Jen oni lumigis al ni

lanternon por plifaciligi al ni la iradon!" kaj ŝi ne plu sentis timon. Iufoje ŝi flegis vunditojn. Ĉiuj-vunditoj estis tre ĝojaj escepte de unu kiu venis el la batalo por sturme rompi la 38an paralelon; li ĝemadis malkoĝe. Ŝi demandis kial li estis malĝoja. La vundito diris: "Eh, kamaradino, mi nur iom sangis, tio ja ne indas menciion. Sed mi pensas, ke mi devus, antaŭ ol vundiĝi, sturme transiri la 38an paralelon, malfeliĉe mi vundiĝis norde, de la 38a paralelo..." Alifoje ŝi iris sur la fronton por partopreni bataladon. La malamikaj kanonoj furioze tondradis, tamen dume kelkaj batalantoj tie kviete riparitis siajn ŝuojn. Ŝi pensis mirigite: Kial la batalantoj okupiĝas per tia faro senutila dum tia terura kanonado? Ŝi demandis kaj la batalantoj respondis ridante: "Sen bone riparitaj ŝuoj, kiel ni povos sukcese postkuri la malamikojn iom poste je ilia retiriĝo!" Tion dirinte ŝi ekturnis sur min sian rigardon kaj diris kortuŝite:

"Juĝu vi mem, ĉu niaj batalantoj ne estas herooj! Post vundiĝo ili ankoraŭ pensas pri antaŭenmarŝo, kaj pri persekutado al la malamikoj ilia furioza kanonado! Vivante kun tiaj herooj, kiel ni povus ne kuragiĝi?... Kaj en la venonteco, ankaŭ ni povos..."

"Kion?" mi demandis.

"Ankaŭ ni..." ŝi ekridis mallaŭte.

"Diru!"

"Ankaŭ ni povos fariĝi herooj," ŝi prenis grandan kuragon, kaj eldiris sian belan sekreton en la profundo de sia animo. Poste, ŝi energie forpiedbatis ŝtoneton sub la piedo, kaj levis la kapon. Eĉ en la malluma nokto, estis videblaj la fajreroj de juneco brilantaj en ŝiaj okuloj. Ŝi diris serioze: "Ĉu vi opinias ke tio estas ne ebla?"

"Ebla, kompreneble ebla," mi tuj kapiĝis.

"Nepre ebla," ŝi diris jese kaj serioze, "Jes, ni estas tre junaj, ni komprenas ankoraŭ tre malmulte, ni kreskiĝis en cirkonstancoj trankvilaj, ni ankoraŭ ne hardiĝis tra iu ajn severa kaj malfacila situacio. Tamen ĝuste tial necesas ke mi min enmetu en la fornegon, por vidi ĉu mi estas vera peco da ŝtalo. Kiel mi absorbiĝas aŭskultante la malnovajn kamaradojn preparoli siajn malfacilajn bataladon kaj heroojaĵojn. Heroo, heroo, ĝi okupas mian tutan koron. Mi ĉiam pensis: Kiam mi jam povos fariĝi heroo, kaj iom kontribui al mia patrolando? Kaj mi plue pensis: Kiel ili persistis tra la suferoj? Ili estas vere grandaj kaj grandaj gigantoj. Kiel signifoplena estas tia vivo..." Kaj nun ankaŭ mi tiel vivas, ĉu mi povas ne senti gojon? Vidante min ĝoje saltetadi, nia maljuna grupestro ofte diris: 'Petolema bubino, pro kio vi ĝojas la tutan tagon!' Mi ja ĝojas pro tio!"

Elĉinigi Zekun

Batalanto Ĉe l' Landlimo

Ĉaŭ Jang (趙洋)

Hieraŭ ĵus eliris mi el la batalo kaj la batalon gajnis mi per vivorisko. Hodiaŭ mi gardstare ĉe l' landlim' patria Estas ankoraŭ batalanto batalpreta.

Kvankam jam ĉesis nun batal' enlanda, Mian armilon mi ankoraŭ firme tenas. Militon mi ne serĉas, mi nur malpermesas La batalfajron ree tuŝi la patruon.

De l' centro ĝis bordero de la patrolando Tion da montoj kaj riveroj mi trapasis Postrestas ĉie piedsigno de batalo, Kaj ĉiun colon de la patroland' mi amas.

Banditojn pelcasante sur nubtuŝaj montoj Tage kaj nokte mi marŝadis kaj batalis: Dezertaj montoj estis mia lit' soldata, Sovagaj herboj varme kovris mian korpon.

Perforte mi trapasis la riverojn grandajn, Vade postĉasis mi fuĝantajn malamikojn, Somere marŝis mi aŭdace tra l' inundo Kaj vintre mi ne timis eĉ la frostan akvon.

Mi partoprenis ankaŭ sangbatalojn kampajn Kaj mia sango fluis sur la Huaĵhaj-ebeno, El la tranĉe' mi saltis kaj dum kuratako La malamikojn enterigis en la neĝo.

Mi migris dekmil liojn tra la patrolando Kaj vidis kiel ĝi vastegas kaj fekundas: La rizo en la sudo brilas kiel perloj Kaj en la nord' tritikkampar' ondumas ore.

Mi bataladis inter la popolo vasta, Kaj hurakrisis al mi ĉiuj popolanoj, Ili min bonvenigis kvazaŭ sian fraton: En patroland' troviĝas ĉie mia hejmo.

Hodiaŭ gardstarante ĉe l' landlim' patria, Mi enamiĝas jam al la vilaĝ' tiea, Antaŭe ĝi vivadis longe en mizero, Nun fun' felita flirtas super la tegmentoj.

Ne plu kverelas kamparanoj kun edzino, Nun ĉiu havas jam por si grenkampon verdan.

Matene ili iras ĝoje al kamparo, Vespere hejmenvenas min ridalutante.

Kaj la infanoj de l' lernej' vilaga pasas Apud mi ĉiutage, la gajuloj bravaj! En la buŝetoj tondras ĉiam bravaj kantoj Kaj noblan revon havas la infanaj kapoj.

Rabistoj vane penas blovi batalfajron Al nia lando kaj trarompi ĝian pardon. Ili intencas porti al ni la pereon Kaj fari jam cindraĵon el la domoj niaj.

Por la patrio mi trairis cent batalojn, Kaj por ĝi jam sennombrajn kuglojn mi elpafis.

Ĉiam venkante mi elpaŝis el batalo Kaj en ĉiu batalo kaptis malamikojn.

Hodiaŭ sur landlimo de la patrolando Gardstaras mi ankoraŭ por la sankta tero. Kiu kuraĝus tuŝi mian patrolandon, Tiun mi sendos al diablo senprokraste!

Tradukis S. J.



Kresko de la Granda Arterio en Sudokcidenta Ĉinio

Bela perspektivo realigas en valoj laŭlonge de 504 kilometroj de Ĉungking (重慶) ĝis Ĉengtu (成都) en Seĉuan-Provinco (四川省) nun tintadas la marteloj; tondras la eksplozoj; amasiĝas fervojistoj kaj inĝenieroj el ĉiuj partoj de tuta Ĉinio; alportigas lokomotivoj, vagonoj el Nordoriento, Pekino kaj Tienzino, laboristoj kaj kadroj el la ĉirkaŭaj gubernioj, kaj ĉiuj materialoj kaj provizoj el ĉiuj partoj de la lando. Ĉar tie giganta labora armeo de pli ol 100,000 homoj nun kun alta fervoro batalas por la konstruado de la Ĉungking-Ĉengtua Fervojo (成渝鐵路), kiu estas necesa por la prospero de la Sudokcidenta Ĉinio. Tion sopiras la seĉuananoj jam de pli ol 40 jaroj kaj nur nun tio estas realiĝanta.

Jam tuj en la komenco de la konstruado de tiu fervojo en junio de lasta jaro en Seĉuan-Provinco kaj en la tuta Sud-okcidento de Ĉinio estiĝas tute nova aspekto de la ekonomia stato. Kaj en la daŭro de unujara konstruado kune kun la kresko de la fervojo pli kaj pli manifestiĝas la utilo de la fervojo al la popolo. Produktado de multaj entreprenoj, maŝinaj fabrikoj kaj cementfabrikoj rekomenciĝas. Amasoj da senlaboraj laboristoj nun retrovas sian laboron. Miloj kaj miloj da kamparanoj, kiuj suferis de la mizera vivo partoprenas la konstruadon kaj per tio ili ne nur bone vivtenas sin mem, sed ankaŭ bone nutras sian tutan familion.

Ankaŭ agrikulturaj produktoj ricevas novan instigon de la fervoja konstruado. En Neĵkiang (內江), la fama centro de suker-industrio, la sukerkanaj kampoj duobliĝas kompare kun tiuj en lasta jaro. Kaj suker-fabrikoj jam nun preparas grandskalan produktadon. La konstruo de tiu fervojo ja donas al la popolo en Sudokcidento grandan helpon kaj ankoraŭ pli grandan feliĉon ĝi promesas al ili.

Maldolĉa historio Tamen menciinte de la fervojo la historion de tiu fervojo, ni trovas, ke la ĉina popolo, precipe la seĉuananoj, ja multe suferis pro ĝi. La unua konstrua projekto de tiu fervojo ellaboriĝis ekde la jaro 1906, kiam ankoraŭ regis la Manĉua Dinastio. Pasis jam plenaj 43 jaroj ekde tiam ĝis la liberigo en 1949. En tiuj jaroj estis multaj organizoj, kiuj laŭnome respondecis la efektivecon de tiu projekto, kaj la popolo devis elporti pezajn impostojn por la fikcia konstruado de tiu fervojo. Sub la manĉua regado organiziĝis Ĉuan-Ho-Fervoja Kompanio (川河鐵路公司) kaj per ĝi la imperiestro de Manĉua Dinastio multe da mono pruntprenis el imperiistaj landoj. En 1931 parto de seĉuananoj mem kolektis monon por konstruado de tiu fervojo. Kaj dum la regado de la Ĉiang-Kajŝeka banditaro organiziĝis sinsekve en 1933 kaj 1936 Seĉuan-Kuejĉoŭa Fervoja Kompanio (川黔鐵路公司) kun kapitalo de francaj bankistoj kaj Konstrua Administrado de Ĉungking-Ĉengtua Fervojo (成渝鐵路工程局) respektive. Tiuj ĉi organizoj en la 43 jaroj sub la preteksto "konstrui la fervojon" multe ekspluatis la popolon, sed ĉe metron da fervojo ili ne konstruis.

Tamen nur kelkajn monatojn post la liberigo de Sudokcidenta Ĉinio la

Popola Registaro jam komencis senhezite la konstruadon de tiu fervojo. Kvankam la nacia ekonomio ankoraŭ estas en sufiĉe malfacila stato.

Armeanoj samtempe La unua batalantaro en la konstruado surprenas sur sin la batalantoj de la Popola Liberiga Armeo. La nerezisteblaj herooj en la batalempoj



La batalantoj en Ĉuke-Liang-Kunveno

nun fariĝas tuj pioniroj de la konstruado.

Ekde junio 1950, kiam la Ministerio de Fervojo de la Centra Popola Registaro sankciis la projekton pri konstruado de la Ĉungking-Ĉengtua Fervojo, tuj mobiliziĝas miloj da batalantoj, kiuj portas la heroojn medalojn de la bataloj en Huajhaj-regiono (淮海區), trans Jangze-Riveron kaj en Sud-okcidenta Ĉinio. Malgraŭ la varmaga kaj pluvoza vetero ili sinjetis kun martelo kaj vektor al la konstrua fronto.

Spertaj ili estas en bataloj kontraŭ la malamikoj, sed fremda al ili estas laboro pri tero kaj ŝtonoj. Tekniko al ili mankas. Spertojn ili ne havas. Ili eĉ ne komprenas la terminon "kubometroj de terlaboraĵoj", nek povas bone distingi la diversajn ŝtonspecojn, nek lertas pri minado de la ŝtonoj. Sed armeanoj de la Popola Liberiga Armeo neniam timas malfacilojn. Ili havas firmam volon por ilin konkeri. Ili scipovas lerni de la teknikistoj kaj specialistoj. Ili kutimas solvi problemojn per kolektiva diskuto en formo de t.n. "kunveno de Ĉuke-Liang-oj". Tial post nur mallonga tempo ili mastras jam bone la teknikon kaj trovis eĉ multajn novajn metodojn en la laboro. Ekzemple ili trovis novan rimedon por rapida transportado kaj minado, kaj duobligas la laborefikecon kompare eĉ kun la spertaj laboristoj.

Aktivaj la liberig- Kamparanoj ligitaj laboristoj berigintaj kaj kamparanoj laboristoj longe suferintaj pro senlaboreco ankaŭ kun ĝojo senlima partoprenas en la konstruado. En la laboro ili pli kaj pli entuziasmiĝas. La amikeco de la armeanoj, la amema prizorgo pri ilia loĝejo, la helpo al ilia laboro de tiuj neniam antaŭe viditaj armeanoj donis al ili profundan klas-edukadon. Rezulto de la klaskonciigo estas la iniciateco kaj aktiveco en la laboro. Laborkonkursoj ekdisvastiĝas inter la labortacmentoj. Mirindaj sukcesoj atingiĝas ĉiutage. Iuj kelkfoje obligis la laborefikecon, aliaj elpensas novajn rimedojn por akceli la laborrapidecon kaj ŝpari la materialojn. Ekzemple ili kreis specon de glita transportilo, kiu deobligis la transportan kapablon.

La vasta popolamaso en la Sudokcidento ankaŭ mobiliziĝas kaj or-

ganiziĝas por subteni tiun konstruadon. Dank' al tia subtenado multaj problemoj facile solviĝas. Ekzemple mankegas materialoj por reltraboj, ĉar arbaroj en la regionoj laŭlonge de la fervojo jam delonge detruigiĝis sub la regado de la Kuomintang banditaro. Sed la kamparanoj alportis lignon de lokoj pli ol 50 kilometrojn malproksimaj kaj abunde provizas la bezonojn.

Kreskas kaj ekpulsadas la granda arterio de Sudokcidenta Ĉinio

Famkonata jam de antiko estas la diro: "Malfacilon por ĉielen iri oni tuj komprenas, se vojaĝi sur la vojoj de Seĉuan li ekkomprenas." El tio ni povas imagi ankaŭ la malfacilon de vojkonstruado en tiu provinco. Ordinare en ebenaĵo 5,000 kubometroj da ter- aŭ ŝtonlaboraĵoj sufiĉas por konstruo de kilometro da fervojo. Sed en la konstruado de Ĉungking-Ĉengtua Fervojo 400,000

Ĉang Tzu-taŭ: La Liberigintaj

En la regiono, okcidente de Peking-Hankou-Fevolinio (京漢鐵路) kaj oriente de Funiu-Montaro (伏牛山) en Honan-Provinco (河南省), agrara reformo estis efektivegita en la plejparto de la vilaĝoj vintre de 1949. En la pasinta vintro, mi vizitis gubernion Luŝan (魯山), unu el la iam tiel nomitaj banditregionoj. Mi loĝis en iu vilaĝo Ĉangĉuang (張莊) en Luŝan kelkajn tagojn kaj vidis la vivon de la tieaj kamparanoj levigintaj.

Frumatene, la Produkta-Komitato Ĉaŭ Ĉing-suan (趙清椿) de Ĉangĉuang-Vilaĝo venis konduki min suriri sur Luŝanpo-n (魯山坡 monteto en Luŝan), por vidi la vintran produktadon de la vilaĝo. Sur la supro de tiu soleca, ronda kaj kalva monteto oni per soveliloj pene sovelis kaj portis vilaĝen la griznigran teron kun herb-radikoj kaj -ruboj por fari sterkon. De malproksime vidate, la homamasoj estas kvazaŭ formikoj irantaj supren kaj malsupren sur la vojetoj ĉirkaŭ la monteto.

Ĉaŭ diris: Kvankam sur tiu ĉi kalva Luŝanpo troviĝas nur ŝtono sed ne kreskas grenoj, tamen ĉiuj bovoj de la vilaĝo estas paŝtataj sur ĝi dum ilia ripozado post la aŭtuna semado. Kaj en vintro oni forportas de ĝi la griznigran teron por prepari el ĝi sterkon. Tiu ĉi monteto estas ja la fonto de mia vivo! Kaj la plifekundiĝo de la tero dependas de ĝi."

Ne malproksime de tie, kie oni portas la griznigran teron, estas ŝtona kaverno. Ĉaŭ diris al mi, ke ĝi estas la "Kaverno de Feino". Kaj proksime de la montetpiedo troviĝas ankaŭ "Monumento por la Bovpaŝtisto". Pri tiuj ĉi antikvaj restaĵoj ĉirkulas lamekonata legendo, kiun Ĉaŭ

kubometroj da laboraĵoj estas bezonataj, kaj plejparto el ili estas ŝtonlaboraĵoj. En kelkaj lokoj la laboro devas esti farata en krutaj valoj. Tamen per la alta fervoreco kaj persisteco de la armeanoj, kamparanoj la konstruado progresis rapide. Nun la sekcio de Ĉungking ĝis Panĉiaŭ (板橋) 135 kilometrojn longa estas jam finkonstruita.

Kiam la unua vagonaro ekirinta de Ĉungking-stacio atingis la stacion Ĉujangŝi (朱楊溪), 6 kilometrojn oriente de Panĉiaŭ, miloj kaj miloj da popolanoj svariĝis el ĉiuj direktoj de la regiono por vidi la novan vagonaron. Kamparanoj ankoraŭ kun korbo sur dorso, virinoj kun siaj infanoj kaj la studentoj kaj komercistoj dancante la jangdancon kaj ludante la tali-tamburon alkuris por saluti la laborantojn de la fervojo. "La Kuomintang-banditaro scipovis nur nin trompi por plenigi sian monujon, nur la Popola Registaro sincere servas al ni popolo." estas la plej ofte aŭdata parolo inter la amasoj.

La tuta laboro de la 504-kilometra fervojo konsistas el 35,100,000 kubometroj da ter- kaj ŝtonlaboraĵoj, ĉirkaŭ 1,000 pontoj aŭ arkaĵoj kaj pli ol dek gigantaj kaj malfacilaj

rakontis al mi per la simpla lingvo de kamparanoj. Guste ĉi tie naskiĝis la legendo pri la bovpaŝtisto kaj teksistino kiuj dise loĝas ĉe ambaŭ flankoj de la Ĉiela Rivero (t.e. la Lakta Vojo).

Ĉaŭ rakontis: Antaŭ tre tre longe sub Luŝanpo loĝis familio Sun kiu konsistis el geedzoj kaj juna frato. La bofratino traktis la junan fraton tre malbone, per turmentoj kaj insultoj. La juna frato ĉiutage paŝtis bovon sur la monteto. La bovo havis homan senton, kaj helpis la junan fraton eviti multajn insidajn de la bofratino. Poste, la bofratino proponis dividi la hejmajn havaĵojn. La juna frato nenion postulis krom la bovo kaj rompita ĉaro. La bovo efektive estis dia bovo. Kiam la juna frato jungiĝis ĝin al la ĉaro kaj trenis ĝin iri survoje sur la monteton, ili ekflugis ĉielen. Poste, diligenta feina teksistino edziniĝis al la bovpaŝtisto.

Tiu ĉi legendo malkovris la revon de la subpremataj kaj ekspluatataj kamparanoj kiuj deziregis forskui la suferon kaj aspiris al feliĉo. Tamen atendante tra multaj generacioj ili restis same mizeraj, kaj neniu dia bovo venis ilin savi.

En la jaro 1947, la Komunista Partio venis kaj realigis la miljaran revon de la kamparanoj. Por la



La kamparanoj en Ĉangĉuang grupe transportas sterkajon al la kampoj

Lu Ĉih:

Historio de Fera Ĉeno

(daŭrigo)

"Kelke da tagoj poste," daŭrigis la subpelotonestro, "mi estis transportita kune kun kelkaj aliaj al King-ŝing (非經) kondamnita al punlaboro en karbominejo. Kun katenoj ni devis labori tiom, kiom la aliaj. La japanoj longigis niajn katenojn por tio, ke ni kapablu labori. Ĉirkaŭe estis abatisoj, elektraj dratbariloj, sentineloj kaj tranĉeoj.

"Sed ni almenaŭ vidis nun la liberan ĉielon kaj povis moviĝi iom. Dum laborado ni planis forkuron.

"Jun posttagmezon, ni triope ŝteliris unue en fosajon je la senatenteco de la gardisto, kaj rampis poste al la elektra dratbarilo.

"Ju pli streĉa estis la cirkonstanco, des pli batis la koro kaj malfortiĝis la kruroj. Ni atingis la barilon kun granda peno. Unu el ni deŝiris ĉifonajon de sia vesto kaj metis ĝin sur la draton. Nenia brulodoro. La elektra drataro ne estis elektrizita!

"Ni komencis la transgrimpadon. Sed unu el ni tremis pro timo kaj neniel povis movi la piedojn. Li diris: 'Ne zorgu pri mi. Mi ne povas plu iri...'

"Ni du forlasis lin malgraŭvole, transgrimpis la dratbarilon, pasis la abatison kaj alian fosajon. Ni komencis kuri!

"Irinte apenaŭ kvaronon da kilometro, ni aŭdis pafon!

"Ni kuris! Ni ruliĝis! Ni rampis! Ni klopodis ĉiel por savi nin!

"Subite falis mia kamaraĉo. Kuglo trafis lin!

"Mi ĉiam kuris, ruliĝis kaj rampis. Mi ne kuraĝis rigardi malantaŭen! Sed dum la postkurantoj faris unu paŝon, mi devis fari tri por kovri la saman distancon. La malbenitaj mankateno kaj piedkateno malhelpis min svingi la brakojn kaj iri grandpaŝe! La kruroj doloris pro frotado. Mi kaŭriĝis por debati la katenon, sed tute vane: Mi neleviĝis kaj daŭrigis la kuradon malgraŭ ĉio!

"La paŝbruo de la persekutantoj iom post iom proksimiĝis.

"Halto, aŭ ni pafos! Nun estis tute proksime.

"Bastardo! Ankoraŭ ne haltas?"

"Mi estis kaptita. Mi rifuzis moviĝi. Oni batis kaj mi svenis.

"Kiam mi rekonsciis, mi trovis min trenita antaŭen kvazaŭ ligna bloko.

"Mi vidis miajn krurojn levantajn polvon kaj inter ili la katenon, sur kiu estis sango kaj polvo, mia larmo kaj mia malamo!

"Reportite al la karceri, mi estis denove batita kaj svenis. Mi ne konsciis kiel oni batis min, sed ĉe la rekonsciigo, mi trovis, ke la manoj kaj kruroj ne povis plu moviĝi. kvazaŭ ili ne apartenus al mi. Sur ili peziĝis ankoraŭ la katenoj!

"Mi estis resendita al Ŝekiaĉuang. Mi kredis, ke ĉiĵo estos la fino de mia vivo kaj de la vivo de mia infano. Tamen venu la morto! Mortinte mi liberiĝus el zorgo.

"La feraj ĉenoj akompanis min kiel antaŭe. La frotvundoj komenciĝis pusi kaj kovriĝis de muŝlarvoj. Mi tute ne povis moviĝi, mi simple atendis morton.

"Kvazaŭ tondro el klara ĉielo, tute neatendite la japanoj kapitulacis.

"Mi ekploris. Estis la unua fojo post mia enkarcerigo. Kiel mi ĝojis! Rigardante la ferajn ĉenojn mi pensis: 'Tiun ĉi fojon vi certe forlasos min, ĉu ne? Vi certe lasos min iri grandpaŝe?'

"Sed ne!

"Dum la 'packonferenco', Kuomintang forprenis de sur nia pordo la tabulon kun la vortoj 'politikaj arestitoj' kaj anstataŭis ĝin per alia kun la vortoj 'kriminalaj malliberuloj'.

"Ni kriis kaj kriegis: 'Ĉu vi ne diris, ke politikaj arestitoj estos liberigitaj?'

"Sed kiel ajn laŭte vi krius en la karceri, kiu ja aŭdis? Povis aŭdi nur Kuomintang! la gardisto! la ferkradigita fenestro! la nigraj muroj! kaj miaj feraj ĉenoj!

"Ni aŭdis, ke venos la 'Tripersona Interpaciga Grupo' kaj entuziasmiĝis. Unu tagon oni efektive 'invitis' nin el la malliberujo kaj malveraj promesoj kaj sendis nin al alia gubernio—Kaŭĉeng (蕪城). Sed ni estis trompita. Tie atendis nin malluma karceri kaj katenoj kiel antaŭe.

La Kuomintangaj reaktiuloj kaj japanaj diablidoj ja iris la saman vojon.

"Mi denove pendis inter vivo kaj morto. Sed tiufoje mi ne plu esperis morti; mi volis vidi, kia sorto estus rezervita por mi.


"En la vintro de 1946, la 8a-voja Armeo marŝis al Kaŭĉeng. Ni premiĝis al la fenestroj por rigardi la fajron, la flugantajn kuglojn kaj proksimigantan liberon.

"Unu post alia defalis la seruroj kaj malfermiĝis la pordoj. La gardisto, ĝismorte terurita, envenis kun armita 8a-voja batalanto post si.

"Mi jetis min unua sur la kamaradon kaj brakumis lin plorante, kvazaŭ infano vidus sian patrinon post longa disiĝo. Mi ploris kaj ploris...

"Miaj katenoj estis forbatitaj de la komarado. Kvankam estis en nokto, sed en mia koro estis pli hele ol en hela tago! Estas la Komunista Partio, kiu liberiĝis kaj savis min.

"La kamarado jetis unue mian mankateno en angulon de la korto. Poste li volis forjeti ankaŭ mian piedkateno. Tiufoje mi interrompis



Liberigo

Olepenetraĵo de Hu Ji-ĉuan

lin: 'Atendu, kamarado! Mi ĝin konservos.' Mi volis retrovi ankaŭ la mankateno, sed vane. Tiom granda amaso da katenoj, el kiuj ĉiu estis makulita de sango kaj polvo, kiel povus mi distingi la mian de la aliaj?

"Mi prenis la piedkateno kaj iris grandpaŝe el la malliberujo sen rerigardo.

"Kun la kateno en mano mi iris grandpaŝe rekte al la komandejo kaj petis aliĝon al la 8a-voja Armeo!

"Dum marŝado kaj batalo mi ĉiam portis la katenon ĉe mi. Ĉiufoje antaŭ batalo, mi rigardis ĝin. Estis ĝi, kiu pezis sur mi dum du jaroj, ne, dum pluraj generacioj, nun mi volas, ke ĝi ne plu katenu min. Iuj demandis min, kial mi batalas tiel brave. Kiel mi min esprimu?

"Ni 'komencis moveman militadon en 1948. Ĉion decidis ĉi tiuj du kruroj. Por piediri la ekipaĵo devis esti kiel eble plej malpeza. Ni portis nenion krom la pafilo kaj kelkaj grenadoj. La litajojn kaj aliajn superfluaĵojn ni donacis al la kamparanoj. En tranoktoj mi pruntis hakilon kaj frakasis la krampojn de la kateno. Ĝi ne plu pezis sur mi, mi havis nenian timon, ni baldaŭ venkos.

"Restis ĉe mi simple la fera ĉeno. Mi forigis unu ĉeneron post ĉiu venko. Sed mi baldaŭ ŝanĝis mian intencon. Mi volis konservi ĝin kiel memorajon.

"Post nelonge, ni estis reorganizita en specialan korpuson. Intertempe venis letero el mia hejmo. Mia familio ricevis teron dum la agra reformo kaj vivis komforte. La infano estis en elementa lernejo.

"Mi marŝadis kaj batalis, batalis kaj marŝadis tra la Batalo ĉe Lajŝuj (淩水). Batalo Norde de Paŭting (保定), Reatako al Suda Ĉahar (察哈爾) kaj Atako kontraŭ Tajĵuan (太原), tiel ĝis 1948. Kiam ajn mi ŝanceliĝis antaŭ malfacilaĵoj, mi elprenis la feran ĉenon kaj rigardis. La hezitemo tuj malaperis. Ĉar la revolucio estas mia propra afero, estas por mia infano kaj ankaŭ por la tuta popolo.

"Nun ni venkis. La venkon ni gajnis ne facile! Ĝi kostis tiom da homvivoj! La 1-an de oktobro de lasta jaro ni marŝis inter la homamasoj dum la revuo. Kiuj ne manŝvingis aŭ man-klakis al ni? Mi rigardis al la flago kun kvin steloj,

mi rigardis al Prezidanto Maŭ sur Pordego de Ĉiela Paco. Mi deziregis stari sur aŭtomobilo por voki lin, sed mi ne sciis precize kiamaniere!

"Antaŭ nelonge, mi intencis donaci la feran ĉenon al la Ekspozicio en la ekspalaco imperiestra, sed mi ŝanĝis la intencion post rekonsidero. Kial? Ĉar nun denove venas la Usona imperiismo!

"Ho, ĝi denove venas!

"Mia koro doloras kiam mi legas en gazeto la informojn pri la fiagco de la Usonaj invadantoj en Koreio. Ili volas remeti katenojn sur la manojn kaj piedojn de la korea popolo. Ili, tiuj brutoj, eĉ bombadas nian Nordorienton! Ĉu tio ne estas ĝuste same kiel faris la japanoj ĉe Lukoŝiaŭ (蘆溝橋), la 7an de julio, 1937?

"Ĉiuj korvoj en la mondo estas nigraj senescepte. La nura diferenco inter japanoj kaj usonanoj estas tio, ke unu havas pli altan staturon, dum la alia—malpli altan

"Eĉ porkoj aŭ kokoj baraktas kontraŭ morto, ĉu vi kredus, ke la agonianta Usona imperiismo mortos tute rezigne? Antaŭe la japanaj diablidoj invadis nin tra Koreio, nun la Usonaj diablidoj ankaŭ volas invadi nin tra Koreio. Ĉu mi remetu la katenojn sur miajn manojn kaj piedojn? Ne, mi ne povas!

"Dum la lastaj tagoj kelkaj kamaradoj diris, ke mi fartas malbone. Jes, mi fartas malbone. Mi maldormis dum la noktoj. Ekferminte la okulojn mi jam vidis kion faris la Usonaj diablidoj en Koreio kaj aŭdis, ke feraj ĉenoj klaketas sur la korpo de koreoj. Usonanoj ne nur batalas kontraŭ koreoj, sed ankaŭ kontraŭ mi! Kial la aŭtoritatoj ne eldonas ordonon, ke ni tuj batalu kontraŭ la agresantoj?

"Ĉu vi kredas, ke mi timas? Ne, mi ne timas! Mi neniam timis, kiam mi estis katenita de feraj ĉenoj, kion do mi timus, kiam mi estas forskuantata la ferajn ĉenojn?

"Batalu, batalu! Kiam la imperiismo estos ekstermita, mi donacos tiun ĉi feran ĉenon al la batal-ekspozicio, aranĝota de la tutmondaj popoloj. Mi volas diri al ili, ke ĝi neniam plu pezos sur iu ajn!"

Li Hung-kuej malvolvis la paperan pakajeton kaj montris la feran ĉenon al la kamaradoj ĉe la lamplumo. Ili levis la kapojn kaj kvazaŭ vidis la sangmakulojn sur ĝi.

Tradukis S. J.



POR akceli la sciencan studon kaj iom informi al eksterlandoj la sciencajn sukcesojn de moderna Ĉinio la Scienca Akademio de Ĉinio (中國科學院) decidis kompili Sciencan Serion de Moderna Ĉinio. La enhavo de tiu ĉi serio inkluzivos ĉiujn gravajn verkojn de ĉinaj sciencistoj en lastaj 40 jaroj. Ĝi estos eldonataj en la ĉina lingvo kaj ankaŭ en fremdaj lingvoj. Materialoj de la sciencaj verkoj estos klasifikitaj en diversaj branĉoj. En 1951 oni centrigos la laboron ĉefe en kvin fakojn, t.e. matematiko, fiziko, geologio, fiziologio kaj meteorologio. Konforme al tiuj kvin fakoj kvin komisionoj estas organizitaj.

POR partopreni la Mondan Feston de Junularo kaj Studentoj por Paco okazontan je la 5a de aŭgusto en Berlino, la Ĉina Delegacio estas nun preparanta por sia vojaĝo. La Delegacio konsistas el 300 junuloj elektitaj el la tutlanda junularo dum lastaj tri monatoj. Inter ili troviĝas junaj artistoj kaj kelkaj batalherooj el la Ĉinaj Volontuloj en Koreio kaj la Popola Liberiga Armeo. Troviĝas en la delegacio ankaŭ laborherooj, junuloj el la naciaj minoritatoj kaj teamoj de korbopilko kaj volejbolo kaj la akrobata trupo, kiu ĵus revenis el Sovetio kaj Pollando.

Ĉinaj Laboristoj

Jen ĝenerala fenomeno: kie bone disvastiĝas la kleriga movado kaj likvidado de analfabeteco, tie la produktado rapide pliboniĝas. Por la laboristoj, altiĝi sian kulturen nivelon, kaj mastri la lingvan instrumenton estas la antaŭkondiĉo por mastri la sciencan teknikon.

Laboristo Jen King-ŝian (閔景憲) de la ripar-fako de karbovagonoj de Fuŝun-Minejo, antaŭ sia klerigado, ne povis noti la difekton, sed nur signis la vagonon per "X", kiam li trovis difektitan vagonon. Tamen oni ne komprenis kion tiu signo signifas, kaj daŭre uzis la difektitan vagonon kiel sendifektan, sekve okazis akcidento. Partopreninte la lernadon, li ellernis pli ol 1,500 ideografiojn dum naŭ monatoj. Nun kiam li elkontrolis difektitan vagonon, li povas skribi kie ĝi difektiĝis kaj kiel ĝin ripari, kaj akcidento ne plu okazas.

En Kinĉou-Teksejo (金州紡織廠) en la distrikto de Port-Arturo kaj Dajren, la movado lerni legi inter laboristoj antaŭenpuŝis la produktadon: En 1950 j. la plenumo de ŝpintasko superis la planon je 20.63% por la tuta jaro.

La laboristoj, kiuj ellernis legi kaj lernis la aldonitan lecionon "kiel krei novan rekordon", multe pliboniĝis sian produktan teknikon.

NACIAJ minoritatoj de Ĉinio nun ĝuas grandan liberon, por klerigo kaj altgrada edukado. Institutoj por Naciaj Minoritatoj establiĝis jam en la Nordokcidenta, Sudokcidenta kaj Centrasuda Regionoj de Ĉinio. Je la 11a de junio fondiĝis en Pekino denove Centra Instituto por Naciaj Minoritatoj (中央民族學院), en kiu troviĝas 262 studentoj el 25 malsamaj minoritataj nacioj. La ĉefa celo estas trejni kapablajn laborantojn kaj ekspertojn por la nacia konstruado kaj administrado en la minoritataj regionoj.

LA Kultura Delegacio de la Popola Respubliko de Hungario estrata de s-ro Molnar Erik atingis Pekinon je 23a de junio. Ĝi estas komisiita de la registaro de la Popola Respubliko de Hungario por fari kulturen kontrakton inter Ĉinio kaj Hungario por akceli la kulturen interŝanĝon inter tiuj du fratlandoj. Ĝin bonvenigas ĉe la aerodromo k-do Vu Ŝju-ĉuan (伍修權), vicministro por Fremdaj Aferoj,

Ting ŝie-lin (丁燾林), vicministro de Kulturaj Aferoj, Hung Sen (洪深), estro de Interrilata Buroo por Kulturaj Aferoj kun Eksterlandoj kaj reprezentantoj de aliaj ministrioj. Ĉeestis ankaŭ la Sovetia ambasadoro Rosĉin kaj hungara ambasadoro E. Safranko.

POST monatoj da aranĝo de la Arkeologia Fakoj de la Scienca Akademio de Ĉinio kaj Pekina Historia Muzeo malfermiĝis je la 28a de junio Ekspozicio de elfositaj relikvoj kaj objektoj antaŭ trimil jaroj. Ĉiuj ekspoziciaj estas elfositaj en Ping-juan-Provinco (平原), la kultura centro de Jin (殷) -Dinastio (ĉ. 1783-1122 A.K.) sub gvido de k-do Kuo Paŭ-ĝjun (郭寶鈞). El la relikvoj de la viktimitaj homoj, el la beico kaj delikateco de la objektoj kupraj, ostaj, ŝtonaj kaj jadaj kaj ankaŭ argilaj kun glazuro oni povas pli bone koni la historion de Jin-Dinastio kaj povas aserti, ke jam tiam la ĉina popolo eniris klasan

socion kaj atingis altan stadion de civilizacio.

HISTOTERAPIO, la plej grava eltrovo de moderna medicino, nun estas aplikata de la ĉinaj kuracistoj kaj detale esplorata de medicinaj organizoj. La nova terapio konsistas el tre simplaj procesoj. Oni bezonas nur transplantu sub haŭton de la malsanuloj histon detranĉitan de vivantaj kaj konservitan en definitiva daŭro, sub certaj temperaturo kaj aeropremo kaj tio donas al la malsanuloj forton resaniĝi. Ĉar post la fortranĉo en la histo ankoraŭ vivanta naskiĝas ia substanco nomata "biogenika stimulo", kiu povas produkti mirindan efikon al homa korpo. La vasta kliniko en la grandaj hospitaloj en diversaj lokoj de Ĉinio pruvis, ke tiu ĉi terapio estas valorega kaj efika por multaj malsanoj, kiuj ne povas esti kuracitaj alimaniere, ekz. la malsanoj bronka astmo, digesta ulcero, intesta algiuigo post operacio, kaj kelkdek aliaj malsanoj.



Libertempa Ripozado de Bulgaraj Laboristoj

La popola registaro kaj komunista partio en nia lando faras ĉion eblan kaj multe zorgas por plibonigo de la vivo de laboristaro. En lastaj jaroj el la ŝtata budĝeto oni donas ĉiam pli grandajn rimedojn kaj monon por populkerigado, popola sano, hejmkonstruado ktp.

Eksterordinarajn grandajn zorgojn faradas la popola registaro por

garranti kulturen progreson kaj ripozojn de ĉiuj laborantoj laŭ la artikolo 74 de la Dimitrova konstitucio.

La popolregistaro prezentas al la gelaborantoj la plej bonajn kuracokojn en la lando, kiel Borovec, Jundola, montara loko V. Kolarov kaj aliaj. En la pasinteco, ĉe la burĝa-kapitalista reĝimo la belaspektaj vilaĝoj en tieaj lokoj apartenis ekskluzive al la popolparazitaj, spekulaciantoj, kiuj amasigis grandan profiton per la bruta ekspluatado de la vilaĝanoj kaj laboristoj.

Nun tie, en la malnovaj kaj novekonstruitaj vilaĝoj kaj domoj ripozas nur la gelaboristoj, la konstruantoj de la socialismo en nia lando — gefiloj de laborpopolo.

Kune kun la progreso de la socialisma konstruado pli kaj pli bone aranĝiĝas la ripoz-stacioj kaj hospitaloj kaj pli kaj pli multe da laboristoj povas ĝui la feliĉon. Nombro de la ripozintoj en 1945 estas 2,100, en 1947, 20,000 kaj en 1950 atingis 50,000. Laŭ plano de la Komunista Laborista Profesia Unuiĝo nur en ĝiaj ripozoj 65,000 laboristoj estos akceptitaj ĉiutage kaj en tiuj de aliaj profesiaj unuiĝoj 80,000 laboristoj...

Esperanto Societo Assenovgrad, Bulgario

Hontindaĵoj en Lando Kontrolata de Usono

Karaj kamaradoj,

Kun tiu ĉi letero mi sendas al vi du francajn ĵurnalojn, en kiuj vi legos du interesajn legaĵojn. Jen ili estas:

Unue: Sur lasta paĝo de unu ekzemplero vi vidos Karton de mia lando, la blankaj partoj estas okupataj de la Usonaj soldatoj. Baldaŭ la tuta Francio estos okupata de "niaj amikoj" kiuj elŝipigas senĉese militmaterialojn, prenas niajn aviadbazojn, niajn havenojn — precipe Bordo — kaj konstruas ĉe pafejon por flugaj bomboj (V2). Kia hontindaĵo!

Due: Sur alia ekzemplero same en la lasta paĝo vi vidos fotojn de viro soldate vestita. Li estas fama franca

"heroo," volontulo por batali kontraŭ korea popolo.

Nia ministro de milito — "socialista" — kompreneble — diris ĉie, ke la francaj volontuloj estis la fiero de nia lando. Ve! ve! La kelkaj volontuloj trovitaj estas banditoj, precipe tiu fotita sur la ĵurnalo. Li iris al Koreio, ĉar la polico serĉis lin. Jen estas kiel la franca registaro trovis "batalantojn" kontraŭ niaj fratuloj koreaj.

Pli kaj pli la franca popolo komprenas, ke milito kontraŭ Viet-Namo estas malbona milito. Cetere eĉ en nia armeo oni ne trovas volontulojn.

En lasta monato la franca laborista klaso akiris grandan venkon kontraŭ la registaro: Ministroj, fervojistoj, havenistoj, tramistoj ĉiuj belege unuigitaj faris strikon, kompreneble por pligrandigo de salajroj. Nia registaro devigite kliniĝis. Do la francaj laboristoj faris unu paŝon por momente haltigi la militon. Sed ja nun ankoraŭ plejparto de nia nacia budĝeto estas permilita. Ni vidos, ke baldaŭ Francio bankrotiĝos. Jam 800 miliardojn da frankoj atingas la deficiito de la budĝeto.

R. Farail el Francio

98% el la Germanoj

Kontraŭ Rearmado

Karaj kamaradoj,

Bone mi ricevis vian leteron. Multan dankon! Mi tre ĝojis pri ĝi. Mi ne tuj respondis, ĉar multaj laboroj nun amasiĝis. Vi ja scias, ke ni havis la plebisciton pri la rearmado de Germanio kaj pri paco-kontrakto ankoraŭ en jaro 1951. Mi ankaŭ estis membro de balota komisiono. En nia distrikto, la plej granda de la urbo, nur du el 1,700 voĉdoniloj estis senvalidaj, el la validaj pli ol 98% estis JES-votoj. Do, nia rezulto estis tre kontentiga. La baloto daŭris tri tagojn. Ni multe klopodis — kaj vere sukcese — venigi la indiferentulojn kaj helpi al maljunuloj. Kun mia pionira grupo ni kantis progresemajn kantojn diverse-loke antaŭ la balotejoj.

L. Schödl, el D.D.R.-Germanio